# *Fini?as en Havano la klinika provo Fazo III de la vakcina kandidato Soberana 02*

*Image not found or type unknown*

Havano, maj 7 (RHK) La apliko de la tria dozo de la klinika provo Fazo III per la vakcina kandidato Soberana 02, okazanta en Havano, fini?os ?i-monate.

Dum gazetara konferenco televida,  la doktorino pri sciencoj, Maria Eugenia Toledo, ?efesploristino pri la klinikaj provoj de la antigeno evoluigita de la Instituto Finlay de Vakcinoj (IFV), informis ke la sekva pa?o estas plu taksi ?ian efikecon.

Tiu ?i provo Fazo III inkluzivis en la unua etapo 44 010 volontulojn; la? estis decidite, grupo el ili ricevus la trian dozon, alia grupo ricevus du, kaj alia ricevus placebon; ?i lasta grupo ricevos la vakcinan skemon tuj post la fino de la observa periodo.

La? ifnromis la doktorino, ke en la unua dozo oni inkluzivis ?iujn subjektojn, kun konsento informita kaj kontrolo pri ?iu ekskluda kriterio.

Dume, ?i precizigis, la dua dozo ampleksis ?is 42 813 volontulojn, kio reprezentis 97,28% de la atendita totalo de la subjekto-kompletigo.

Inter la unua kaj la dua dozo oni pritaksis la kriteriojn kaj estis homoj, kiuj ne transiris la postan etapon pro diversaj kialoj: estis konta?itaj de Kovim-19, eniris la ekskludajn kriteriojn a? decidis ne plu avanci, klarigis Toledo Romani.

La apliko de la tria dozo por la volontuloj, kiuj ricevis tiun skemon, komenci?is ?i-semajne. La esploristino aldonis ke la etapo inkluzivas, proksimume 14 160 subjektojn, ?ar la aliaj grupoj estas en la skemo de du dozoj, kaj jam finis.

Tiel, la apliko de la lasta dozo devas fini?i en la venontaj du semajnoj, kaj poste ni kontrolos la efikecon de la vakcina kandidato, kio ebligos fini la Fazon III kaj prezenti la raporton pri la taksado anta? la reguliga institucio.

Tiu ?i provo la?plane havos regulajn pritaksojn, tiel ke oni ne devu atendi ?is la fina por mezuri ?ian efikecon, ?i klarigis.

La doktorino klarigis ke la klinikaj provoj evidentigis altnivelan sekurecon de la vakcina kandidato Soberana 02, rilate al la malaltaj niveloj de adversaj sekvoj registritaj, kiuj estis doloro sur la loko injektita proksimume en 20% de la kazoj rilate al la totalo de la vakcinitoj.

fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/256546-finigas-en-havano-la-klinika-provo-fazo-iii-de-la-vakcina-kandidato-soberana-02

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**